


# KATALUNA ESPERANTISTO\*

\* Llingua internacional i drets lingüístics

NUMERO 355-356 (121-122) · KVINA EPOKO · JULIO-DECEMBRO 2010



## La llengua: mitjà o recurs?

Kataluna Esperanto-Asocio festis sian centjariĝon

Altnivelaj libroprezentoj en Valencio kaj Barcelono

Quants eren els esperantistes catalans?

## PROTESTO KONTRAŬ MALDEMOKRATIA VERDIKTO

La hispana Tribunal Supremo (Supera Kortumo) per tri inter si kongruaj verdiktoj severe tordis la lingvan sistemon uzatan en la katalunaj lernejoj jam de antaŭ 30 jaroj. La leĝeco de la kataluna sistemo fontis el la “ley orgánica” (hispana leĝo laŭ rango nur sub Konstitucio) Estatut d’Autonomia de Catalunya. La kataluna sistemo pruvis dum sia vivo sian bonecon kaj estis agnoskita kiel tre rekomendinda flanke de diversaj eŭropaj instancoj. Ekzemple, ĝi kongruis kun la informo ‘Multilingualism: an asset for Europe and a shared commitment’ voĉdonita de la Eŭropa Parlamento la 24an de marto 2009. Pri la kataluna lingva modelo en la lernejoj, la altnivela esploro prezentita de la komisaro pri Multlingvismo Leonard Orban kadre de la Eŭropa Komisiono la 27an de septembro 2007, oni diris “ĝi estas modelo sekvinda por la cetero de la landoj en Eŭropa Unio.”

Por tio la Tribunal Supremo baziĝis sur freŝa, maldemokratia verdikto de la Tribunal Constitucional (Prikonstitucia Tribunalo), verdikto ŝanĝanta leĝon donitan de la Hispana Parlamento, poste referendum aprobitan de la kataluna popolo.

Kataluna Esperanto-Asocio plej energie protestas verdikton atencan kontraŭ la volo de la kataluna popolo kaj kiu endanĝerigas nian socian koherecon. Aldone, nia asocio, kohere kun ceteraj organizoj por homaj kaj lingvaj rajtoj, konsideras civitanan malobeon kiel la respondon plej demokratian.

Kataluna Esperanto-Asocio, la 24an de decembro de 2010

## PROTESTA CONTRA UNA SENTÈNCIA ANTIDEMOCRÀTICA

El Tribunal Suprem espanyol per mitjà de tres sentències coherents entre elles ha distorsionat severament el model lingüístic usat a les escoles catalanes des de fa 30 anys. La legitimitat del sistema català es fonamentava en l’Estatut d’Autonomia de Catalunya, que té rang de llei orgànica. Durant la seva vigència, el sistema català va demostrar la seva validesa i era reconegut com molt recomanable per part de diverses instàncies europees. Per exemple, concordava amb l’informe ‘Multilingualism: an asset for Europe and a shared commitment’, votat al Parlament Europeu el 24 de març de 2009. Sobre el model lingüístic català a les escoles, a l’estudi d’alt nivell presentat pel comisari de Multilingüisme Leonard Orban en el marc de la Comissió Europea el 27 de setembre de 2007, es deia “és un model a seguir per la resta dels països de la Unió Europea.”

Per tal cosa el Tribunal Suprem es basà en una recent i antidemocràtica sentència del Tribunal Constitucional, sentència que canviava una llei feta pel Parlament Espanyol i posteriorment aprovada en referèndum pel poble català.

L’Associació Catalana d’Esperanto protesta energicament contra aquesta sentència que ataca la voluntat del poble català i que posa en perill la nostra cohesió social. A més, la nostra associació, coherent amb les altres organitzacions de drets humans i lingüístics, considera la desobediència civil com la resposta més democràtica.

Associació Catalana d’Esperanto, 24 de desembre de 2010.

En ĉi tiu numero kunlaboris: Chus García, Dani Cortijo, Darío Rodríguez, David Garcia Falcó, Dolors Godoy, Éric Collignon, Francesc Poblet, Gerard Sugranyes, Guillem Gómez, Guillem Sevilla, Hèctor Alòs, Joan Inglada, Josep Enric Peres i Blesa, Josep Franquesa, Karles Berga, Llibert Puig, Óscar Puig, Ramon Llop, Ramon Perera, Ramon Rius, Sophia Berlin, Xavi Batlle, Xavier Margais.

**Associació Catalana d’Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio:**  
Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio  
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2009: individua abonanta membro, 64 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; individua dumviva membro, 1280 eŭroj; kolektiva membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.  
Banko: Caixa d’Enginyers, Agència 001, Barcelona  
kontonumero: 3025 0001 15 1433398158  
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158  
Konto UEA: kaea-b  
CIF: G-58338567  
Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto:

Impres a/Presita ĉe: Recordgraf, C/Mandoni 6, 08004 Barcelona, tel. 93 331 94 44. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Kovrilo: lernejo en Uzbekio partoprenanta la projekton  
www.theoneminutesjr.org. Bildo de Chris Schuepp.

Josep Franquesa; sekretario: Ramon Perera; kasisto: Sebastià Ribes; komitatoj: Àngels del Pozo Serrano, Gemma Armadans, Víctor Solé.  
Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Óscar Puig.

### Kataluna Esperantisto:

Redaktoro: Ferriol Macip i Bonet; katalunlingva redaktoro: Hèctor Alòs i Font; esperantlingva revizianto: Karles Berga; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

### Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: joves@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/joves  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d’Enginyers, Agència 002, Barcelona  
kontonumero: 3025 0002 47 1433276794  
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Aida Sunyol, Anna Raventós, Roger Sanjaume.

Portada: una escola de l’Uzbekistan partoprenanta en el projekto  
www.theoneminutesjr.org. Foto de Chris Schuepp.



# KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO FESTIS SIAN CENTJARIĜON

Éric Collignon kaj Ramon Llop

Jam cent jarojn post la unua kongreso en la sama urbo, Sabadell, sidejo ankaŭ de la lasta kongreso. Ĉeestis en Casal Pere Quart pli ol 100 personoj. Matene prelegis nia samasocio kaj historiisto Dani Cortijo, populara dank'al sia libro *Histories de la historia de Barcelona*, jam en la 4a eldono. Li parolis ĉi-foje pri la historio de la kataluna esperantista movado, kaj klare kaj koncize skizis la precipajn mejloŝtonojn de nia landa movado kaj la aspektojn de lingva demokratio kaj lingva ekologio. Post la prelego la publiko starigis viglan diskuton.

Poste prelegis Aureli Argemí, prezidanto de CIEMEN, pri la observejo pri lingvaj rajtoj. Li didaktike kaj trankvile rakontis la problemojn por la agnosko de la ĉarto pri lingvaj rajtoj ĉe mondaj oficialaj instancoj, t.e. Unesko kaj UN.

Tagmeze, okdedo da homoj kuniĝis en la restoracio "La Clau de Fa". Tie, ĉe la bufedo de la restoracio atendis nin grandega surprizo: bonvenaj vortoj en Esperanto, skribitaj de la respondeculoj de la manĝejo. Jen delikata afablaĵo kiun ni alte aprezis.

Post agrabla kunestado kaj ĝuoplena manĝado, ni reiris al Casal Pere Quart por sekvi la posttagmezan programon.

Je la 18a komenciĝis omaĝo al Núria Coll, 50jara estraranino de Centro de Esperanto Sabadell (CES), kiu tragike forpasis pasint-somere. Ĉeestis du el ŝiaj fratinoj. Dum la omaĝo, Éric Collignon, memorigis, per lumbildoj kaj tekstoj, kelkajn el la multnombraj kortuŝaj memoraroj travivitaj kun Núria dum sia kvin-jara partopreno en la vivo de CES. Partopreno en kongresoj, vivo de la aktivulino, instruado, vojaĝoj, tradukadoj, legadoj... la kampoj kie Núria aktivis estis senlimaj. Meze de la lumbilda prezento, Margarida Ustrell, kunvojaĝanto de Núria en la Universalaj Kongresoj de Italio kaj Japanio, rememoris momentojn travivitajn tie kaj tiam. Post la prezentado, Llibert Puig legis poemojn de Joan Salvat-Papasseit en Esperanto, ĉar danke al Núria, en la ekspozicio pri la poeto starigita de la registaro de Katalunio ĝis marto 2011, estas poemoj liaj tradukitaj al Esperanto far Abel Montagut. Post tiu legado, José-Luis



GERARDO SUGRANYES

Landry, ano de CES, ravis nin per muzika kaj danca spektaklo en kiu kastanjetoj akompanis klasikajn muzikerojn. Temas pri arto, heredita de lia majstro, José de Udaeta.

Por konkludi, la ĉefa momento de la posttagmezo estis koncerto de Kaj Tiel Plu kiu ĵus aperigis novan KDon "Surplacen venu ni", albumo kiu spegulas voĉan kaj muzikan pliriĉigon kaj pliprofundigon de la muzika bando kaj kiu prezentas tradiciajn kantojn el Katalunio, Okcitanio, Hispanio, Anglio, Danio, Kroatio, Kabilio ktp. Oni povis ĝui belegan tute akustikan koncerton kiu multe taŭgis por tiu pli sentoplena omaĝo. □

***Pasis cent jaroj  
post la unua  
Kataluna Kongreso  
de Esperanto  
en Sabadell***

# ALTNIVELAJ LIBROPREZENTOJ



PRATS I CAMPS

**La verko,  
kompilita  
de Francesc Poblet  
kaj de Hèctor Alòs  
vekis grandan  
intereson en la  
kataluna socio**

**L**a libro *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*, estas la tria volumo pri la historio de la esperanto-movado en la katalunlingvaj landoj dulingva en la kataluna kaj en Esperanto. Ĝi kunigas dudek unu artikolojn de dek kvar specialistoj, kiuj prezentas diversajn kaj komplementajn aspektojn pri la Esperanto-movado en la Katalunaj Landoj inter 1900 kaj 1940, konservante la kombinaĵon de legoplezuro kaj scienca rigoro de la du antaŭaj verkoj. La verko, kompilita de Francesc Poblet i Fejoo kaj de Hèctor Alòs i Font vekis grandan intereson en la kataluna socio. Krom recenzoj en prestiĝaj amaskomunikiloj, okazis pluraj libroprezentoj el kiuj elstaras tiuj okazintaj en la Centro pri Nuntempa Kulturo de Valencio kaj en la Muzeo pri Historio de Katalunio en Barcelono.

## EN VALENCIO

La 9an de novembro estis prezentata en Oktubre Centre de Cultura Contemporània, Centro pri Nuntempa Kulturo de Valencio, la libro de Francesc Poblet i Fejoo kaj Hèctor

Alòs i Font *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*. Ĉirkaŭ kvardek homoj plenigis la salonon interesigintaj pri nia movado. La partopreno estis kontentiga, eĉ se pluraj homoj manifestis sian maleblon ĉeesti pro samtempa manifestacio proteste al perforto okazinta en Ajuno.

Inter la publiko, kiu sekvis kun plej granda intereso la paroladojn, estis ja multaj malnovaj esperantistoj, sed ankaŭ neinicitoj, precipe venintaj el lokaj sociaj movadoj. Indas rimarki la ĉeeston de esperantistoj el ĉiuj tendencoj, t.e. el neŭtraluloj ĝis sennaciuloj, fakto montranta, ke la intereso pri diskonigo de nia lingvo kaj kulturo kapablas venki la diferencojn.

Post la bonvenaj vortoj de nia prezidanto Llibert Puig i Gandia, parolis nia samasociano Josep Enric Peres i Blesa, kiu prelegis pri Esperanto kiel planlingvo. Li skizis al ni la historion de la planlingvoj ĝis la apero de la nuntempaj internaciaj helplingvoj. La preleganto konkludis, ke Esperanto estas fakte la sola konstruita lingvo kiu eliris el sia intelekta kaj socia medio por iĝi lingvo de internacia

komunumo; laŭ li, la subteno de la popolaj klasoj garantiis al ĝi la sukceson.

Poste prelegis Guillem Gómez i Blanch, ano de Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE). Li mallonge detalis la politikan historion de nia movado kaj konkludis, ke malfermiĝas antaŭ ni du agadkampoj prilaborindaj: tutmonde proponi Esperanton kiel lingvon de la alimondisma movado kaj, en Eŭropo, kiel lingvon de la maldekstrularo.

La trian prelegon faris la kunordiganto de nia asocio, Ferriol Macip i Bonet. Lia prelego pritraktis la prezentitan libron kaj la valorojn kaj principojn de nia Asocio kiuj baziĝas sur la idearo de la unua esperantismo. Kortuŝa momento estis, kiam Ferriol Macip menciis kiel gravan kontribuon al la Esperanta kulturo la *Katalunan Antologion*, kompilitan de Jaume Grau i Casas, kies filo kaj nepo sidis inter la publiko.

Amaskomunikiloj pritraktis la eventon. La publika radio Canal 9 Ràdio anoncis la eventon kaj intervjuis Josep E. Peres i Blesa. *Infomigjorn*, la plej disvastiĝinta reta bulteno de la lando, jam plurfoje recenzinta la libron, raportis la eventon kaj publikigis la prelegon de Guillem Gómez. Ankaŭ la tutlanda papera revuo *L'Accent* ankaŭ publikigis recenzon.

## EN BARCELONO

La 15an de decembro, la libro estis prezentita en la Muzeo pri Historio de Katalunio. Prezidis la aranĝon Agustí Alcoberro, direktoro de la muzeo kiu prelegis kune kun Ferriol Macip, kunordiganto de Kataluna Esperanto-Asocio, Francesc Poblet, kunaŭtoro de la libro, kaj la fama ĵurnalisto kaj historiisto Josep M. Solé i Sabaté, kiu enkondukas ĉiun semajnon prihistorian programon en Catalunya Ràdio, la ĉefa radio de Katalunio.

El ĉiuj paroladoj elstaris la miro de Solé i Sabaté pri esperantismo kaj la kuraĝigo daŭrigi tiun vojon. Post la paroladoj, la publiko, kiu plenigis la salonon, intervenis kreante intensan, interesan kaj fruktodonan debaton. □



GUILLEM SEVILLA

*La 9an de novembro la prezento okazis en Octubre Centre de Cultura Contemporània, Centro pri Nuntempa Kulturo de Valencio*



FRANCESC POBLET

*Josep M. Solé, Francesc Poblet, Ferriol Macip kaj Agustí Alcoberro prezentis la libron en la muzeo pri historio de Katalunio en Barcelono la 15an de decembro*

Prave oni diris, ke “la historio de la kataluna esperanto-movado estas interesege”. Aliĝis al la ideo de universala neŭtrala lingvo militistoj kaj katalunistoj, pastroj kaj framasonoj, burĝoj kaj liberecanoj. Rilatis al ĝi personoj kiel Frederic Pujulà, Joan Amades, Delfi Dalmau, Carles Riba, Andreu Nin aŭ Joan Mascaró, sed ankaŭ virinoj, kiuj ekorganizis sin, aŭ laboristoj de la fabrikoj en Barcelono, Sabadell, Alcoi... La es-

perantismo estis interklasa, transversa movado, sed samtempe la tiamaj sociaj bataloj okulfrappe evidentiĝis en ĝi: troviĝis homoj, la plimulto, kiuj vidis en ĝi elementon por ŝanĝi la socion al pli granda socia justico, al nacia emancipiĝo aŭ al ambaŭ aferoj, kaj aliaj, kiuj pledis por konservi la laboristan ekspluatadon, la asimilajn politikojn aŭ ambaŭ aferojn, ofte nome de nepolitikemo. (El la Antaŭparolo de la libro)



## BOSNIO, JARCENTO DA EMOCIO

Meze de aŭtuno, bosnaj esperantistoj festis sian unuan jarcenton kaj, okaze de tiu jubileo, organizis en Sarajevo Rondan Tablon pri la lingvaj kaj kulturaj aspektoj de Eŭropa Unio. Pluraj gravaj movadaj ĉefrolantoj estis invititaj prelegi kaj debati tie: D-ro Fabrizio Penachietti, D-ro Michael Duc Goninaz, Zlatko Tišljarić, István Ertl, Đorđe Dragojlović, Maria Butan, Nikola Rašić, Bardhyl Selimi, Eduard Kusters kaj mi mem, sendube pli pro la intima amika rilato kiu delonge ligas niajn popolojn ol pro miaj personaj kapabloj pri la debatita temo.

La aranĝo ne nur estis interese pro la alta nivelo de la partoprenantoj kaj la riĉeco de la referaĵoj, sed ankaŭ pro la impone bona organizado, plurfoje pruvita eĉ en la plej malfacilaj kondiĉoj. La elekto de la temo ne estis hazarda sed plene kongrua kun lerte preparita strategio por engaĝigi la movadon en la plej tikkaj kaj interesvekaj temoj por la ĝenerala publiko kaj, tiel farante, subtile identigi la internacilingvan ideon kun la gvide plej gravaj movadoj.

La emocioj havis centran rolon tra la tuta aranĝo, kiel ja devas esti dum tia festado. La unuaj notoj de Bembaša el la rava voĉo de Lejla Jusić tuj emociigis nin ĉiujn kaj tio estis nur

la komenco. La larmoj ne havis tempon sekigi kiam novaj elfluis anstataŭe. Senad Ĉolić resumis la jarcenton de aktivado en brila prelego kie ĉiuj estis menciitaj kaj kiu reliefigis la malfacilan sed firman marŝon de la bosnaj esperantistoj. La menciita amikeco inter bosnoj kaj katalunoj trovis novan okazon montriĝi kiam la organizantoj disdonis diplomojn al ĉiuj kunlaborantoj kaj la plej kortuŝe prezentita estis tiu por nia asocio, ankaŭ festanta samjare sian centjarigon.

Ne povis manki en tia jubileo la alvido al la estonteco kaj nenio pli promesplena ol la inaŭguro en la urbocentro de nova sidejo, la unua postmilita, kiu rolas kiel bonega elirpunkto por ekpaŝi sian duan jarcenton, marŝo kiun ni daŭre faros paralele.

Òscar Puig

## KURSOJ EN BARCELONO

La 10an kaj 11an de novembro komenciĝis la ĉi-jaraj kursoj de Esperanto en Barcelono. Ekde ĉi tiu jaro, oni disponas pri oficejo en la sidejo de CIEMEN —en la centra strato Rocafort de Barcelono—, kiu havigas al ni pli da spaco kaj rilatigas nian asocion kun aliaj kiuj ankaŭ batalas por la gentaj rajtoj de Katalunio. La instruado konsistas el tri niveloj (komencanta, progresanta kaj konversacio rondo) gvidataj respektive de Ramon Perera, Ramon Rius kaj Ferriol Macip kaj okazantaj merkrede kaj jaŭde. La unuaj lecionoj estis tre sukcesaj ĉar la nombro da lernantoj estis sufiĉe granda.

Aliflanke oni ankaŭ ekinstruis Esperanton, je komenca nivelo, en la Libera Universitato *La Rimaia* de Barcelono je la komenca nivelo. La lecionoj okazas ĉiulunde kaj estas gvidataj de Ramon Perera kaj Ramon Rius. Per tiu kunlaboro nia asocio provas aligi Esperanton al socialaj movadoj. Ĉi tiu interligo estas tre necesa por la antaŭeniro de nia lingvo.

rr

## MANIFESTO POR MINORIGITAJ LINGVOJ

Kataluna Esperanto-Asocio subskribis la manifeston “Txikiak handi” [elp. ĉikiak andi] (grandaj malgrandaj) starigita de la asocio Nafarroan Oinez, kiu promocias la eŭskan en la lernejoj de la eŭska provinco Nafaro. La manifesto estis publikigita en la eŭska, gaela, kataluna, aragona, bretona, kimra, okcitana kaj nederlanda. Ĝi depostulas la rajtojn de la minorigitaj lingvoj laŭ la ĉi-apuda kadro.

red

***La aranĝo ne nur estis interese pro la alta nivelo de la partoprenantoj kaj la riĉeco de la referaĵoj, sed ankaŭ pro la impone bona organizado, plurfoje pruvita eĉ en la plej malfacilaj kondiĉoj***

### GRANDAJ MALGRANDAJ

Subskribantoj de tiu manifesto deklaras, ke

- la mondo estas plurlingva
- lingvoj estas kultura havaĵo alportantaj diversecon kaj riĉecon al la popoloj el la tuta mondo
- lingvoj estas esencaj por la disvolviĝo de la popolaj kaj personaj identecoj

depostulas

- la rajton de minorigitaj lingvoj esti respektataj
- la rajton uzi nian lingvon en ĉiuj socialaj medioj
- la rajton je kompleta oficialeco de niaj lingvoj en siaj teritorioj
- la rajton ricevi apogon por normaligi niajn lingvojn, ĉefe en edukado

sindevigas

- daŭre labori por normaligo de niaj lingvoj, per kreado de ligiloj, ĉar unueco inter malgrandaj igas nin grandaj
- disvastigi kiel eble plej vaste tiun manifeston

## MALAVARA LIBRO-DONACO AL UNIVERSITATO

La 3an decembro, la rektorino de la Baleara Universitato d-rino Montserrat Casas akceptis membrojn de Majoroka Esperantistaro, por festi kaj subskribi la ricevon de preskaŭ 200 esperantaj libroj donacitaj de Isabel Marín al la biblioteko de la Universitato.

Isabel Marín estas filino de Vicent Marín, pionira esperantisto. Antaŭ la milito, li rolis en Nova Sento, esperantista asocio en la kvartalo Poble Nou, en Barcelono. Inter pluraj aliaj taskoj, en tiu asocio li instruis Esperanton.

La plejmulto de la libroj, kiujn la familio Marín Gil donacis al la Baleara Universitato, estis eldonataj dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la pasinta jarcento. Lingvistoj, sciencaj esploristoj, esperantistoj, homoj, povos legi, lerni kaj profunde studi ĉi tiujn verkojn temantaj pri universala literaturo, historio, politika eseo, lingvistiko ktp. kaj dank'al la malavara konduo de tiu familio. En sia parolado, la rektorino de la Universitato dankis la familion Marín Gil pro la donaco kaj ŝi esperas ke tiu ĉi kolekto de libroj helpos kaj permesos sciencajn studojn.

xm

## EN LA ALTERNATIVAJ FESTOJ DE BURJASSOT

Burjassot, naskiĝloko de la fama poeto Vicent Andrés Estellés, estas urbeto proksima al Valencio. Kadre de ties urbaj festoj, okazis inter la 1a kaj la 3a de oktobro la unuaj *Alternativaj Festoj*, organizitaj de la kultura asocio Bassot. Krom tradiciaj fajrokuradoj, kantoj, koncertoj kaj prelegoj elstaris foiro pri ekologia agrokulturo kaj sociaj kolektivitoj. Tie starigis budon esperantistoj el diversaj organizoj (Kataluna Esperanto-Asocio, Valencio Esperanto-Grupo, Eŭropo Demokratio Esperanto kaj Sennacieca Asocio Tutmonda). Pluraj homoj vizitis la budon interesigintaj pri nia movado.

jepib

## NOVA SIDEJO EN BARCELONO

De antaŭ malmultaj tagoj, barcelonaj esperantistoj disponas novan sidejon por plenumi niajn aktivajn. Ĝi estas sidejo bonege adaptita al niaj celoj kaj situata en tre favora medio. Temas pri malgranda oficejo, utiligata kun alia asocio, sed sufiĉe granda por komforte instrui seshoman grupon kaj kun ebleco disponi salonojn por konkretaj aktivaj. Ĝi



*La rektorino de la Baleara Universitato d-rino Montserrat Casas, akceptis membrojn de Majoroka Esperantistaro, por subskribi la donacon de preskaŭ 200 esperantaj libroj*



*En la foiro pri ekologia agrokulturo kaj sociaj anaroj de Burjassot pluraj homoj vizitis la budon interesigintaj pri nia movado*

situas en spaco CIEMEN, pionira asocio pri defendo de etnaj kaj naciaj minoritatoj, spaco kie ankaŭ laboras pluraj asocioj aktivaj en la civitanaro.

Tiu sidejo estos utila ne nur al barcelonanoj, sed ĝi ankaŭ reprezentos nian Asocion en nia urbo, manko sentita de antaŭ longe.

rp



JOSEP FRANQUESA

En la postmanĝo la tenoro profesoro Fujimo kantis kanton verkitan de Isobe rememore pri la hispana intercivitana milito

## KATALUNA BUKEDO EN JAPANIO

La 17an de oktobro okazis en la hotelo *Yamagata Grand Hotel* de la samnoma japana urbo bankedo-bukedo nomata “Rememoro el Katalunio” en kiu partoprenis 180 personoj. Ĝin organizis japanaj esperantistoj laŭ iniciato de Sho Isobe, japana samideano ŝatanto de nia lando kiun li plurfoje vizitis. Jamagata estas ĉefurbo de agrokultura regiono komparebla, laŭ Shi Isobe, al Lleida pro la fruktoproduktado. Niaj samasocioj Josep Franquesa kaj Mundeta Gòdia estis invititaj partopreni la bankedon kiel reprezentantoj de Katalunio kaj de nia Asocio.

En la menuo estis tomatŝmirita pano kaj ŝinko, terpompaprika omeleto, marbesta paelo, kabajako de angilo laŭ la stilo de Deltebre, kolbaso kun pomsaŭco, brasika salato, kataluntipa kremoj kaj katalunstila buterkuko. Kafo kaj likvoroj helpis digesti la abundan tradician manĝon.

En la postmanĝo elstaris kanto verkita de Isobe rememore pri la hispana intercivitana milito kaj speciale dediĉita al la katalunaj invititoj kies patroj suferis en frankisma koncentrejo. La tuta partoprenantaro akompanis la tenoron profesoron Fujimo de la muzika fakultato de Jamagata.

jf/red

## NOVA KATALUNA-ESPERANTO VORTARO

La pasintan novembron estis rete eldonita nova vortaro kataluna-Esperanto. Temas pri 19 000-kapvorta verko komputike eltirita el la dulingva vortaro uzata de la aŭtomata tradukilo de la kataluna al Esperanto. Tiel, unuavide temas pri la larĝe plej ampleksa vortaro de la kataluna al Esperanto. Tamen, kiel la aŭtoro de la eltiro kaj formatigo, Hèctor Alòs, substrekas en la enkondukaj vortoj de la libro, ĝi havas esencan limigon: la motoro, sur kiu funkcias la aŭtomata tradukilo nuntempe ne permesas doni pli ol po unu tradukon por ĉiu kapvorto. Tio kaŭzas, ke ekzemple por la vorto *església* aperas nur *preĝejo*, kvankam ekzistas ankaŭ aliaj kapvortoj kiel *església catòlica*, *església anglicana* k.a., en kiuj *església* estas tradukita kiel *eklezio*. La redaktoro atentigas ankaŭ pri la manko de derivitaj kapvortoj, ekz. de-verbaj substantivoj (tipe per *-ció* aŭ *-ment*), de-substantivaj adjektivoj (per i.a. *-al*, *-ari*), de-adjektivaj adverboj (per *-ment*) ktp., kaj petas helpon por ilin kompletigi. Tio permesus al la aŭtomata tradukilo senteble pliboniĝi.

La 307-paĝa vortaro estas libere elŝutebla en PDF-formato ĉe [www.esperanto.cat/vortaro/apertium-ca-eo.pdf](http://www.esperanto.cat/vortaro/apertium-ca-eo.pdf).

haf

## ESPERANTO EN LA TRADUKILO DE SOFTCATALÀ

La volontula organizo, kiu tradukadas kaj disponigas amason da programoj en la kataluna Softcatalà, informis ke ĝi adoptis kaj ekuzis la tradukilojn de Apertium en la katalunan kaj el ĝi. La paĝo por tie uzi la tradukilojn estas [www.softcatala.org/traductor](http://www.softcatala.org/traductor). Por la momento Softcatalà ne disponigas ankoraŭ la tradukilon de la kataluna al Esperanto, sed anoncas, ke ĝi tion baldaŭ faros.

haf/red

## EN LA AMASKOMUNIKILOJ

En ĉi tiu lasta periodo amaskomunikiloj daŭre informadis pri nia afero. Tiel, *InfoMigjorn*, la plej disvastiginta reta bulteno publikigis artikolon de Josep Enric Peres i Blesa okaze de la valencia prezento de la libro *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*.

La libro vekis ankaŭ la intereson de *La Vanguardia*, tuthispania ĵurnalo eldonata en Bar-



JOSEP FRANQUESA

En la hotelo Yamagata Grand Hotel de la samnoma japana urbo okazis bankedo-bukedo nomata “rememoro el Katalunio” en kiu partoprenis 180 personoj



celono, kiu aperigis artikoleon pri la esperantisma idearo. En ĝi, Oriol Pi de Cabanyes parolas pri la taŭgeco de Esperanto kaj pri la granda akceptado de esperantismo en la kataluna socio laŭ legeblas en la recenzata libro. La artikolo ankaŭ priskribas la agadon de la Muzeo Esperanto de Subirats kaj konstatas, ke “la idealo daŭre vivas”.

Radioj ankaŭ kutime parolas pri Esperanto. La valencia Rádío Malva intervjuis Guillem Gómez Blanch kaj Raúl Salinas Monteagudo, kiuj substrekis la utilon de Esperanto en interreto kaj utilon de interreto por Esperanto. Dum la elsendo eblis aŭskulti kantojn de La Pafklik’ kaj de Kaj Tiel Plu. Fine, oni debatis pri lingvo kaj politiko.

La tutlanda revuo *L’Accent*, en sia numero 183, ankaŭ recenzas la libron pri historio. La ĵurnalisto asertas ke Esperanto rolas kiel praktika ilo por praktikaj homoj, kunordiga ilo por proletaj internaciistoj kaj demokratia garantio por lingvaj minoritatoj.

cg/red

## EKSPOZICIO EN CASSÀ DE LA SELVA

La pasintan 17an de decembro solene estis inaŭgurita ekspozicio pri esperantaĵoj en Cassà de la Selva, kadre de la urba ĉefesto. La urbestro, la magistratano pri kulturo, kaj la prezidanto de nia Asocio, Llibert Puig, inaŭguris la ekspozicion kaj alparolis la ĉeestantaron kune kun M. Dolors Godoy, loka aktivulino instiganta la ekspozicion.

Bunta afiŝo vaste distribuita altiris pli ol 20 homojn, kiuj esprimis sian kontenton kaj interese.

Post pluraj jardekoj, esperanto-movado reaperis en Cassà de la Selva. En 1914 Joaquim Rich salutis nome de la loka Esperanto-Grupo “Lernejo kaj manĝejo” dum la 5a Kataluna Kongreso de Esperanto. Kaŝita ĝermo ekfloris, nome M. Dolors Godoy, kiu entuziasme revigligis la movadon en la urbo.

Nia loka samasociano ankaŭ organizas kurson en la urbo, kiu gastigos la venontan Iberian Renkontiĝon inter la 13a kaj la 15a de majo ĉi-jara. Dum la aranĝo ni donacos kelkajn librojn al la loka biblioteko, kiu montris grandan intereson.

lpg



*La pasintan 17an de decembro estis solene inaŭgurita ekspozicio pri esperantaĵoj en Cassà de la Selva, kadre de la loka ĉefesto*

## LAŬ LA SPUROJ DE MILICIANO

Antaŭ iom pli ol unu jaro, nia samasocio Dani Cortijo, historiisto kaj fakulo pri nuntempa barcelona historio, malkovris strangan surmuran skribaĵon en la barcelona kvartalo Barceloneta kie estis skribite “Miquel Pedrola”. Kelkaj maljunuloj partoprenintaj la hispanan intercivitanan militon klarigis, ke Miquel Pedrola estis miliciano de la marksisma partio POUM. Dani Cortijo esploris ĉefe tra malnovaj ĵurnaloj. En la memoraĵoj de la esperantisto Ramón Fernández Jurado li legis malfeliĉan morton de Miquel Pedrola de kiu li estis kamarado. La jaron 1936, tuj post la forpaso de la miliciano, la najbaroj de la kvartalo Barceloneta ŝanĝis la nomon de la strato Sant Miquel al “Miquel Pedrola”. La skribaĵo malkovrita de Dani Cortijo estas unu el la malmultaj restaĵoj de la stratnomoj de Barcelono dum la hispana intercivitana milito.

Dum Dani Cortijo esploris la aferon, komenciĝis restaŭrado de la konstruaĵo tenanta la historie interesan skribaĵon. Ĝia konservado riskis malaperi. Cortijo penis por la konservado de la skribaĵo kaj ricevis la apogon de Pino Suárez, kvartala historiisto kaj aktivulino en kvartalaj asocioj. Ili sukcesis konservi la skribaĵon kaj la memoron de Miquel Pedrola.

La ĉefa televidkanalo de Katalunio TV3, produktis kaj elsendis raporton pri la afero en kiu Dani Cortijo montris multajn originalajn bildojn kaj filmojn pri la historio de Miquel Pe-

***La skribaĵo malkovrita de Dani Cortijo estas unu el la malmultaj restaĵoj de la stratnomoj de Barcelono dum la hispana intercivitana milito***



DANI CORTIJO

*La jaron 1936, tuj post la forpaso de la miliciano, la najbraroj de la kvartalo Barceloneta ŝanĝis la nomon de la strato Sant Miquel al Miquel Pedrola*

drola. Tuj poste, spektinte la televidraporton, familianoj de Miquel Pedrola kontaktis la defendintojn de la skribaĵo. Iom poste, ili havis la okazon interkonatiĝi kun José Moratalla, maljunulo batalinta kun Pedrola.

La pasintan 25an de novembro okazis grava omaĝo al la kontraŭfaŝisma miliciano Miquel Pedrola en kiu partoprenis kvincento da homoj laŭ la ĵurnalo *Público*.

Baldaŭ aperos en la revuo *Ebre 38* longa artikolo de Dani Cortijo kun bildoj de la tiama fama fotisto Agustí Centelles pri la afero Miquel Pedrola.

Laŭ la lastaj esploroj, Pedrola havis filinon kiu fuĝis en Francion post la milito. Cortijo esperas renkonti ŝin baldaŭ.

dc/red

## EN POLUDNICA 2011

Kompare al pli grandaj renkontiĝoj, la etaj havas specialan ĉarmon: Oni povas pli facile interagi kun ĉiuj partoprenantoj kaj havi pli proksiman rilaton kun ili. Tial ni decidis aliĝi al *Poludnica 2011* post JES, sed ne nur pro tio. Neniām antaŭe ni estis en Slovakio kaj ankaŭ la programo de la renkontiĝo tre allogis nin. Estis proponitaj skiado, glitkurado, saŭnado, promenadoj kaj – pro tio la nomo de la renkontiĝo – grimpado sur la monton Poludnica, unu el la pintoj de Tatroj.

La renkontiĝon organizas ĉiujare ekde 1983 la esperanto-klubo de la regiono Liptovský, kaj la partoprenantaro iĝas pli kaj pli internacia. La vilaĝo Liptovský Ján estis nia gastejo kaj la komenca punkto de ĉiuj ekskursoj. Ĝi troviĝas en tre monta regiono norde de Slovakio, sufiĉe proksime al la pola landlimo.

Pro malsano ni bedaŭrinde ne povis partopreni la sportan programon, tamen ni ĝuis la amikecan etoson. Homoj vekigis tre frue por profiti la matenon, i.a. por partopreni geografian kurson aŭ jam ekekursi. Kiel jam menciite, la programo estis tre diversa kaj distra, kaj dum la vespermanĝo oni interŝanĝis la spertojn de la tago. Poste oni sidis en granda rondo en la prelegĉambro kaj aŭskultis la interesajn kaj amuzajn vojaĝraportojn, dum oni regalis nin per teo. La oficiala programo finiĝis ĉiam per geografia kvizo, tre bone ellaborita de Marek Blahuš. La lastan vesperon okazis la ĝoje atendita finalo kun la plej bonaj partoprenintoj, kie Indrě Pileckytě montris sian talenton por geografio.

Kvankam la plimulto de la partoprenantoj estis slovakoj kaj inter ili eĉ kelkaj komencantoj, oni preskaŭ ĉiam parolis Esperanton. Konklude ni pasigis tre agrablan tempon en Liptovský Ján, kvankam ni ne povis grimpi kun la aliaj al Poludnica – plia kialo por reveni al Slovakio!



XAVI BATLLE

*Estis proponitaj skiado, glitkurado, saŭnado, promenadoj kaj – pro tio la nomo de la renkontiĝo – grimpado sur la monton Poludnica, unu el la pintoj de Tatroj*

Sophia Berlin kaj Xavi Batlle



# NOVA ETAPO EN LA MUZEO

Joan Inglada

**E**kde la remalfermo de la Muzeo de Esperanto en Subirats-Sant Pau d'Ordal, pli ol centoj da homoj vizitis ĝin, inter kiuj elstaras gravuloj pri politiko kaj kulturo. Amaskomunikiloj multe informis pri la muzeo, same ĵurnaloj kiel televido. La blogo de la muzeo ([www.museuesperanto.org](http://www.museuesperanto.org)) ricevis kelkajn milojn da vizitantoj. Estis starigitaj grupoj de amikoj kaj ŝatantoj de la muzeo ĉe Facebook kaj Ipernity kaj specifa kanalo en Youtube. Eĉ la kataluna registaro informas en sia retejo pri la muzeo en [ves.cat/ap4U](http://ves.cat/ap4U).

## Propono iĝi publika biblioteko

La pasintan 8an de oktobro, en Agrokultura Centro de Sant Pau d'Ordal, urbeto de la municipo Subirats, la Asocio Amikoj de la Esperanto-Muzeo de Subirats, publike prezentis en kiu punkto troviĝas la propono pri la kreado de publika biblioteko en la municipo ses monatojn post la remalfermo de la muzeo. La ideo igi la muzeon publika biblioteko specialiĝinta pri Esperanto eĥas la deziron de ĝia fondinto, Lluís Hernández Yzal.

Daniel Garcia Peris, direktoro de la Turisma Organizaĵo de Subirats, prezentis la aranĝon kaj substrekis la gravan turisman valoron de la muzeo en tiu vinprodukta regiono. La iniciatinto de la civitana grupo, Josep Tubau, raportis pri la demarŝoj ĉe la institucioj rilate al la konstruo de publika biblioteko kaj emfazis la gravecon igi ĝin fakbiblioteko pri Esperanto laŭ la sama linio kiel aliaj fakaj bibliotekoj. Joan Inglada substrekis la viglan staton de la internacia lingvo en Interreto kaj ekzamenis la kolektojn de pluraj esperantistaj bibliotekoj en la tuta mondo. Rafael Hernández, posedanto kaj zorganto de la muzeo, prezentis la nunan staton de la katalogo.

## Gustumeti Esperanton

La 13an de oktobro okazis gustumado de Esperanto. La aranĝo konsistis en gvidita vizito al la muzeo fare de Karles Berga, kaj malgranda enkonduka ateliero pri la internacia lingvo fare de Ramon Perera. Partoprenis homoj el diversaj urboj kiuj taksis la aranĝon amuza, interesa kaj renovema (aŭ novigema).

## Favora ministro pri kulturo

La ĵus elektita ministro pri kulturo de Katalunio, Ferran Mascarell, estis unu el la pre-



De maldekstre dekstren: Daniel García Peris, Rafael Hernández, Joan Inglada kaj Josep Tubau

legantoj de la civitana prezento “Por publika biblioteko en Subirats pri Esperanto”. Ni esperas, do, ke tiu fakto helpas la prosperon de la propono. Dum lia agado kiel respondeculo pri kulturo de Barcelono, la nombro de bibliotekoj en la urbo kreskis de 18 ĝis 40, kaj la nombro de uzantoj de malpli ol miliono al pli ol sep milionoj nuntempe.

## Nova gvidanto

Ekde la 8a de januaro 2011 Montse Piñeiro estas la nova gvidantino de la muzeo kiu sekvas la bonkvalitan kaj dankindan laboron faritan de Karles Berga, la ĝistiam gvidanto.

## Tagoj pri historia memoro

La 22an de januaro, Ferriol Macip kaj Joan Inglada prezentis la libron *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*. Macip parolis pri la enhavo, la procezo de la kompilado kaj la esperanta ideo tutmonde kaj en Katalunio. Inglada klarigis la uzadon de Esperanto dum la hispana milito en Katalunio. La evento okazis kadre de la unuaj tagoj de Subirats por instigi la malforgeson de la historio, inter la 21a kaj la 23a de januaro 2011. En tiuj tagoj estis prezentita ekspozicio sub la titolo “Milito kaj paco: Esperanto kaj intercivitana milito”. La programo inkluzivis ankaŭ viziton al la rifuĝejoj, al la kastelo de Subirats, al la Muzeo de Esperanto kaj promenadon laŭ la itinero de la lasta milita defendo de Barcelono, okazinta ĝuste en Subirats.

La agaplano de la Muzeo de Esperanto proponas lernejan atelieron pri enkonduko al Esperanto, seminarion pri “Esperanto kaj kinarto” kaj du prelegojn pri muzeologio: “Paperoj kaj objektoj” kaj “Muzeoj kaj socio”. □

**La Asocio Amikoj de la Muzeo de Esperanto de Subirats vigligis la muzeon kaj organizadas aranĝojn ĉirkaŭ ĝi**

**Ses monatoj post la remalfermo de la muzeo, la klopodoj igi la muzeon publika fakbiblioteko pri Esperanto estas esperigaj**

**La ideo igi la muzeon publika biblioteko eĥas la deziron de ĝia fondinto, Lluís Hernández Yzal**



# RETA ANGULETO

Darío Rodríguez

La retpaĝaro Edukado.net, fondita en 2001 far Katalin Kováts estas nun komplete ĝisdatigita. La renovigo kostis 32 000 eŭrojn, plejparte financitaj far la usona Fondaĵo por Esperantaj Studoj. Ĉi paĝaro havas nun pli ol 2200 membrojn en 106 landoj, precipe instruistoj de Esperanto, kiuj povas ricevi rete konkretajn helpojn por sia laboro, informojn pri lerniloj, serĉi inter la pli ol 600 uzpretaj ekzercoj, pluperfektigi legante fakajn artikolojn. Krome, funkcias koresponda servo, listo de movadaj kaj lernejoj kursoj, kaj en la forumo de la paĝaro eblas pridiskuti diversajn metodikajn kaj lingvajn problemojn. Ĝia katalunlingva prezento troveblas ĉe: [www.edukado.net/multlingvaj?l=ca](http://www.edukado.net/multlingvaj?l=ca).

Albano Cruz kreis esperantan tajpilon por Mac bazita sur la kataluna / hispana klavaro. Tiel la tajpado estas pli komforta ol per la kutima uzo de esperanta tajpilo bazita sur la usona klavaro: [naikodemus.wordpress.com/2010/10/10/mac-os-x-teclado-en-esperanto](http://naikodemus.wordpress.com/2010/10/10/mac-os-x-teclado-en-esperanto).

Ekzistas multnombraj referencoj al la iama Raporto de la Ligo de Nacioj pri Esperanto (jaro 1922), per kiu tiu internacia institucio (antaŭanto de Unuiĝintaj Nacioj) favoris la instruadon de nia lingvo. Kiel sciante, la afero fiaskis pro la veto de la franca registaro. Estis malfacile pristudi la kompletan tekston de tiu grava historia dokumento, sed oni lokalizis la anglan version en la reta arĥivo de la Universitato de Kalifornio: [www.archive.org/details/esperantoasinter00leagrich](http://www.archive.org/details/esperantoasinter00leagrich)

La franca teksto troveblas ĉe: [vortareto.free.fr/argumentaire/sdn/sdn\\_index.htm](http://vortareto.free.fr/argumentaire/sdn/sdn_index.htm).

Kaj jen surprizo: Ramon Perera trovis en sia biblioteko broŝuron 47-paĝan kun la teksto de tiu raporto en hispana lingvo. Li ĝin skanis kaj oni provizore povas elŝuti aŭ legi ĝin ĉe: [www.telefonica.net/web2/dariorls/ligonacioj.pdf](http://www.telefonica.net/web2/dariorls/ligonacioj.pdf).

Baldaŭ ĝi troveblas en la paĝaro de KEA.

La kataluna <> esperanta vortaro de Joan Inglada estas inkludita, apud 28 aliaj lingvoj, en la instalebla programo “La Vortaro”: [www.la-vortaro.net](http://www.la-vortaro.net).

En la retejo [esperanto-tv.com/radio](http://esperanto-tv.com/radio) troveblas ligilo al la retpaĝoj de 11 radiaj programoj en Esperanto.

“Mojosa” estas esperanta vorto kun signifo egala al tiu de la angla vorto “cool” en ties signifo de moderna, bonega. Efektive temas pri mallongigo de triradika kunmetaĵo: M J S (modern-junstila). Nun aperis retpaĝaro dediĉita al novaĵoj por esperantistoj kiuj sin konsideras enkadrigitaj en tiu kategorio. Vidu ĝin en: [mojose.wordpress.com/mojose](http://mojose.wordpress.com/mojose).

La kvin prelegoj de la Esperantologia Konferenco en Havano 2010 troveblas kiel filmoj en la Reta Kinejo de UEA, apud aliaj pluraj interesaj filmo-raportoj: [www.ipernity.com/doc/97850/home](http://www.ipernity.com/doc/97850/home).

Estis kreita nova socia retejo laŭ la devizo “de esperantistoj por esperantistoj”. En Esperanto.com oni povas komuniki kun amikoj, krei grupojn kaj partopreni en ili, aliĝi al eventoj, verki blogaĵojn, alŝuti fotojn, ludi ludojn, diskuti ks. Vidu ĝin en: [esperanto.com](http://esperanto.com).

Pluraj interesaj sciencaj artikoloj en Esperanto troveblas en la eldono 2010 de la revuo *Teleskopo*. Elŝutebla el: [teleskopo.com/2010.htm](http://teleskopo.com/2010.htm).

ESPSOF estas iom kompleksa elŝutebla programo por kontroli kaj analizi tekstojn en Esperanto. Ĝi taŭgas speciale por reviziado kaj vortstatistika analizo de longaj tekstoj: gazetartikoloj, eseoj, literaturaj verkoj. Provu ĝin ĉe: [www.espsof.com](http://www.espsof.com).

Gramatikilo estas programo por gramatika analizo de mallongaj tekstoj; krome, ĝi detektas erarojn pri akuzativo: [www.012.upp.so-net.ne.jp/klivo/gramatikilo](http://www.012.upp.so-net.ne.jp/klivo/gramatikilo). □

## LASTE APERIS EN KIS-TV

### KISTV-HISTORIO: MANOLA MORENO

La 5an de oktobro 2010 Manola Moreno forpasis en la okcitana urbo Dònavila, apud Tuluzo. Ŝi rifuĝis tie post la hispana inter-civitana milito kune kun sia edzo Alfonso Martorell. Tie naskiĝis iliaj filoj Liberto, Floréal kaj Jasmin.

Manola Moreno, kun sia familio, fuĝis norden el la kataluna urbo Reus, piede sub pafoj kaj bombatakoj. Post kelkaj jaroj en koncentrejo, la patro estis forportita en nazian koncentrejon en Germanio, la frato fuĝis al Meksiko kaj ŝi estis reportita el Brieg (Bretonio) al Reus.

La skipo de KIS-TV vizitis ŝin kaj ŝian filon Liberto en ilia domo en Dònavila. En tiu ĉi filmeto Manola Moreno rakontas al ni,

kiel ŝi re-fuĝis el Reus al Okcitanio tra Andoro por renkonti sian edzon.

### KISTV-MOVADO: 34A KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

Raporto pri la 34a Kataluna Kongreso de Esperanto okazinta en Sabadell, la 6an, 7an kaj 8an de decembro 2008.

Ses-minuta filmeto kiu resumas la iron de la 34a Kataluna Kongreso de Esperanto. Jen rapida “kameramumo” al ĝia etoso, ĝiaj prelegoj, teatraĵoj, koncertoj, omaĝo al Llibert Puig kaj adiaŭo al Hèctor Alòs. □

# QUANTS EREN ELS ESPERANTISTES CATALANS? EL PES RELATIU DELS ESPERANTISTES CATALANS EN L'ESPERANTISME MUNDIAL EN ELS ANYS 1920

Hèctor Alòs i Font

**Q**uants esperantistes hi ha al món o a Catalunya és una pregunta que es fa sovint i és difícil de contestar. Un dels problemes és la indefinició del terme *esperantista*, que pot significar tant algú que parla esperanto (tal com defineixen el terme els diccionaris d'esperanto) o que és “partidari de l'esperanto” (tal com el defineix, per exemple, el Diccionari de l'Institut d'Estudis Catalans). Què vol dir exactament “partidari de l'esperanto” no és gens clar perquè hi ha i hi ha hagut entre aquests partidaris nombroses propostes d'especificar-ne uns usos que hauria d'assolir, les quals resulten sovint contradictòries. Per altra banda, qui es pot considerar parlant d'una llengua que no és la seva materna no és gens clar, donat que s'assoleixen nivells molt diferents de domini i, a més, aquests acostumen a perdre's si no es té un contacte, actiu i passiu, sovintejat amb la llengua. Això ho mostra el fet que diferents estadístiques aparegudes en els darrers anys fixen el nombre de “parlants” d'anglès a Catalunya entre el 10% i el 30% de la població: no sembla gens fiable una dada que es pot quantificar amb un marge d'oscil·lació d'1 a 3. No tenim més que un ordre de magnitud.

